Redakta Komitato: D-ro A. Albault, M. Ĝivoje, Prof. J. Görlich, D-ro P. Neergaard, Prof. B. Popović, Prof. S. Reiersöl, C. Stöp-Bowitz.
Ĉefa kaj respondeca redaktoro Prof. B. Popović, Ognjena Price 80, BEOGRAD, Jugoslavio

Lingva kontrolanto Prof. M. Šaponjić, Svetosavska 23/I, BEOGRAD, Jugoslavio

Eldono de INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA
Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 7,5 Ned. gld. = 2,2 dol. = 25 N. Din.
Por membroj de I. S. A. E. la jarabono 25 steloj (la jarkotizo 10 steloj)
La abonojn kolektas la landaj delegitoj de ISAE
(La listo troviĝas sur la lasta kovrilpaĝo)

Štampa: »Vuk Karadžić«, Niš; Stanka Paunovića 72. — Telefon 25-444. Izdaje naučna sekcija Saveza esperantista Jugoslavije Svetosavska 16 Beograd (=jugoslovenska podružnica Međunarodnog naučnog društva esperantista). Za izdavača: odgovorni urednik Prof. Dr. Bož. Popović, (Ognjena Price 80, Beograd)

SCIENCA REVUO

UDK 001 (05) = 408.92
Vol. 20
N-ro 2 (78)
10. 5. 1969.

Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 2,2 us. dol. = 25 din

Enhavo:

A. Vaitilavičius: Ĉu regula aŭ ĥaosa uzado de la artikolo?
R. Sikorski: Atentinda verko
E. Mihajlova: »Kiel aperos la ĝenerala lingvo?«
K. J. Young: Elektraj fajriloj por pipoj kaj cigaredoj
F. G. Blázquez: Eraroj en la instruado de fiziko
J. Chvosta: Atestoj pri la ekzisto de Atlantis
J. Matvijiŝin: Historio de la matematikaj sciencoj en Ukrainio

415.4 (42/48+408.92)

ĈU REGULA AŬ ĤAOSA UZADO DE LA ARTIKOLO?

(A. Vaitilaviĉius, Vilnius, Sovetunio)

La fundamenta gramatiko de Esperanto faris per sia mallongeco, kaj senescepteco tutan revolucion en la eŭropa kompreno de la nocio mem de gramatiko. Ĝi forĵetis ĉiujn absurdajn reguloin kaj malregulojn, per kiuj abundas gramatikoj de eŭropaj lingvoj. Tiamaniere gramatiko de Esperanto fariĝis pleje originala, sendependa de naciaj gramatikoj, ĝi atingis supron de logikeco kaj facileco kaj per tio donis al la lingvo mem plej grandan kompreneblecon, eliminante dusencecon kaj malklarecon.

Nur per unu regulo la zamenhofa gramatiko restis kunligita kun naciaj lingvoj, kaj per tiu ĉi regulo invadis en nian lingvon ankaŭ karaktera por naciaj lingvoj malreguleco kaj mallogikeco. Ni tuj devas precizigi, ke ĉi tie temas pri uzado de artikolo „la". Do, la invadinta

malreguleco tuŝas nur unu punkton de nia lingvo, ne difektante la ĝeneralan logikecon en ĉiuj aliaj aspektoj. Nun ne estas tempo diskuti, ĉu entute enkonduko de la artikolo en la lingvon estis necesa, ĉar plejmulito de naciaj lingvoj en la mondo tute ne bezonas ĝin. Zamenhof sin bazis sur ĉefajn eŭropajn lingvojn, precipe sur la artikolhovantan francan, kiu tiutempe ludis eĉ certan internacian rolon. La artikolo estas ero de la Fundamento kaj ni ne rajtas ĝin forĵeti. Diskutado pri ĝia neceso estus pure filozofia kaj ni ne okupos nin per tio.

Alia afero estas ĝia uzado. Pri tio Zamenhof lasis al ni grandan liberon. La praktiko montras, ke esperantistoj eluzas tiun liberon grandskale. Ni vidas tekstojn, kie preskaŭ ĉiu substantivo estas „plibeligita" per **la**, kaj aliajn, kie la artikolo preskaŭ entute ne estas trovebla. Ni devas tuj konstati, ke tia stato tre malmulte influas sencon kaj klarecon de la tekstoj. Tamen ambaŭ ekstremoj de misuzo de la artikolo malagrable tuŝas lingvan guston de postulemaj konantoj de la afero, ĝi donas al la lingvo mem trajton de nereguleco. De tio certagrade suferas prestiĝo de Esperanto kiel lingvo regula, logika, lingvo kun gramatiko senescepta.

Sed ĉu ni povas paroli pri misuzo de la artikolo, se la regulo mem estas tiel malmulte precizigita?

La indiko uzi la artikolon „kiel en aliaj lingvoj", strikte kom prenante, ne estas plenumebla, ĉar regularoj pri artikoloj en diversaj lingvoj diferencas. En la germana lingvo artikoloj servas ne nur por difino de substantivo, sed ankaŭ por kazoj. En la franca kaj hispana lingvoj ili difinas nur nombron kaj genron de substantivo, sed ne kazojn, en la franca ili havas krome specialan formon por difini partecan substantivon. En la angla lingvo ilia servo ankoraŭ limitiĝas: la difina artikolo montras ĉi tie nek kazojn, nek nombron, nek genron. Ekzistas lingvoj, kiuj anstataŭ apartaj vortetoj por difinigo uzas specialajn finaĵojn. Ekz en la bulgara lingvo anstataŭ difina artikolo oni almetas al substantivoj, adjektivoj kaj posedaj pronomoj finaĵojn at, jat, ta, to, te; en la litova lingvo por difino de aĵoj aŭ uloj, distingiĝantaj per certaj ecoj de aliaj sampecaj, oni almetas al akompananta adjektivo finaĵojn asis, oji.

La difino de diversaj vortkategorioj multe varias de lingvo al lingvo. Por analizi ĉion ĉi oni devus verki grandajn volumojn. Ni mencios nur kelkajn ekzemplojn. Francoj artikolumas nomojn de ĉiuj landoj, germanoj — nur kelkajn, nome, se la lando havas nomon de ina genro. Germanoj nomojn de urboj uzas sen artikolo, ankaŭ francoj kaj angloj, sed tiuj ĉi du lastaj kelkajn urbojn tamen plibeligas per artikolo. Germanoj regule artikolumas nomojn de jarsezonoj, monatoj kaj semajnotagoj. Hispanoj tion faras ankaŭ, sed ne ĉiam, francoj — neniam.

Tiajn kaj aliajn diferencojn oni trovas komparante gramatikojn de la lingvoj. Multe pli da diferencoj oni trovas komparante la praktikon de diverslingvanoj. Plej facile oni rimarkas tion komparante tradukaĵojn el unu artikolhava lingvo al alia. Ekz. mi havas libron, kies titolo en la angla lingvo laŭtas „From witchkraft to world health" (De sorĉo ĝis mondsano) kaj en germana traduko ĝi jam artikolumiĝis „Von der Zaubereizur Weltgesundheit, do „De **la** sorĉado ĝis **la** mondsano". Mi trarigardis multajn sciencajn kaj beletrajn librojn en tiuj ĉi du lingvoj kaj tre ofte trovis malsaman uzadon de artikoloj ĉe samaj aŭ samkategoriaj vortoj en samaj situacioj. Ekz. ambaŭ lingvoj havas saman regulon pri artikolumo de reprezentantoj de sia speco. Sed en la germana lingvo mi ĉiam trovis der Mensch, die Menschheit (la homo, la homaro), do, kun artikolo, kaj en la angla — man, mankind — sen artikolo. Ankaŭ unikaj abstraktaj nocioj, kiel paco, amikeco, frateco, en la germana lingvo estas uzataj kutime kun artikolo, kaj en la angla — sen.

Nacilingva uzado de la artikolo

Sed eble en aparta artikolhava lingvo artikoloj estas uzataj laŭ reguloj de la koncerna gramatiko? Mi trafoliumis multajn librojn en la angla kaj germana lingvoj kaj ĉiupaŝe trovis spitadon de la reguloj. Ekz, en la germana traduko de „From witchkraft to world health" ni interŝanĝe trovas vortojn medicino kaj la medicino, kuracisto kaj la kuracisto en la samaj esprimkondiĉoj. Mi trarigardis titolojn de infektmalsanoj en kvar gravaj germanaj gvidlibroj. En tri el ili la plejmulto estas sen artikolo kun kelkaj esceptoj, en unu — ĉiuj, eĉ latinlingvaj, kun ertikoloj, krom tri, por kiuj la aŭtoro domaĝis doni la artikolon. W. Grunke en sia gvidlibro nur unu malsanon distingis per artikolo, nome „das Wolhynische Fieber". En la angla medicina literaturo titoloj de malsanoj estas kudime sen artikoloj, malofte kun ĝi. Titoloj de mikroboj en la granda amerika gvidlibro „Bacterial and mycotic infections of man" estas skribataj kun artikoloj, sed bedaŭrindajn kaŭzantojn de pesto, listeriozo, haŭtmikozo kaj kelkajn aliajn la aŭtoroj elpelis kontraŭ publiko „nudajn", t. e. sen artikolo. En la libro „Mankind against the killers" sur la paĝo 160 ni legas: „...the people would not eat minnows" (la popolo ne manĝos la foksenojn) kaj du linioj pli malsupre: „The Thais in the area would not eat minnows" (la tajlandanoj en la regiono ne manĝos foksenojn). Do, du analogaj frazoj kun malsama uzo de la artikolo ĉe la sama vorto. La diferenco estus pravigebla, se la senartikolaj foksenoj starus pli antaŭe, sed nun la stato estas tute kontraŭregula.

Sed eble nur sciencistoj malatentas la gramatikon pri la artikoloj? Foliumu ni, ekzemple, la grandan germanan libron »Humor der Nationen«. Jam inter titoloj ni vidas grandan malregulecon en uzado de artikoloj. Neniel ni povas klarigi, kial samkategoriaj titolaj substantivoj unuloke estas skribataj kun difina, aliloke — kun nedifina artikolo aŭ tute sen ĝi. El la teksto ni citu nur unu frazon: »Der Fürst trug alsdann eine zweckmässige, sehr grosschirmige Mütze, blaue Brille, das breite schwarze Halstuch...« (276 pĝ.). Ĉi tie en unu frazo vortoj de sama kategorio havas tri formojn de artikolumo. En la angla beletra literaturo ni trovas ankaŭ similajn malregulaĵojn.

Ĉar esperantistoj devas sekvi la nacian manieron de la artikolumado, krome, ili faras tion ĉiu laŭ sia propra nacia lingvo, uzado de la artikolo en Esperanto estas eĉ pli malregula ol en naciaj lingvoj. Prenu ni iun ajn libron aŭ gazeton, analizu pro kio ie staras la artikolo, ie mankas? Analizu laŭ la plej larĝaj reguloj pri uzo de la artikolo, donitaj en la gramatiko de K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Kial ni vidas, ekzemple, unu apud alia jenajn parojn de libroj kun tiaj titoloj: »La patrino« (de E. Zahn, tradukis J. Ŝmid) kaj »Bofilino« (de Karaslavov, tradukis Simeonov), »La batalo de l'vivo« (de C. Dickens, tradukis L. Zamenhof) kaj »Batalo pri la domo de Heikkilä« (de Linankoski, tradukis Setälä), »La morto de Blanjo« (de J. Tousseul, tradukis Bergiers) kaj »Morto de Danton« (de Tolstoj). Ni citu ankaŭ jenan frazon: »...oni diskutis pri la rolo de TEJO en la lerneja kampanjo kaj pri rolo de Esperanto-movado por enkonduko de Esperanto en la lernejojn« (Heroldo de Esperanto, no. 13—14 de 7. IX. 1963, pĝ. 9). Kial rolo de TEJO estas difinita kaj tiu de Esperanto-movado — nedifinita?

Malregulecon de la artikolumado montras ankaŭ la antaŭe menciita kvanta diferenco ĉe apartaj aŭtoroj. Mi faris malgrandan statistikon tiurilate.

Proporcio inter »la« kaj substantivoj ĉe Zamenhof (laŭ citaĵoj en la libro de M. Boulton »Zamenhof«):

Parolado en UK en Vaŝington 1910 (paĝoj 190—191)	47:5	= 9,4
Teksto de M. Boulton (paĝoj 158—159)	109:36	= 3,27
Gvidartikolo de »Bulgara Esperantisto«, no. 5, 1962, s. t. »Al pli bona lingva nivelo«	194:92	= 2,1

Kiel ni vidas, rekordon ĉi tie havas niaj bulgaraj amikoj. Ankaŭ sen ia ajn kalkulado Esperanto-literaturo de bulgaroj falas en okulojn per trouzo de la artikolo. Certe ĉi tie influas bulgara lingvo. Mi kalkulis, ke en la nomita artikolo estas nepraj nur 13 artikoloj, aliaj 13 estas tolereblaj kaj la ceteraj 66 — superfluaj. Se en la numero de »B. E.« la tuta teksto estas tiel saturigita per la artikolo, por la superfluaj »la« ĝi bezonas preskaŭ tutan paĝon. Ĉu ne estus pli racie en tiu ŝparinda paĝo doni ian interesan materialon anstataŭ la senbezona »lalado«?

Revenante al la problemo ĝenerale, ni devas konstati, ke esperantologoj jam antaŭ longe komprenis, ke la nomita zamenhofa regulo ne sufiĉas, kaj kelkaj provis precizigi ĝin. Paul Fruictier jam en jaro 1903 (»Esperanta sintakso«, Paris) donis regulojn pri uzado de la artikolo en ok ĉapitroj, 23 punktoj kun sep aldonaj rimarkoj sur 8 paĝoj. K. Kalocsay kaj G. Waringhien en »Plena gramatiko de Esperanto« (1938) destinas por la artikolo kvin grandajn paĝojn. La samaj amplekso kaj tezoj restis en la tria eldono (1958) de la gramatiko. Ambaŭ tiuj traktatoj verdire prezentas nur transprenon de regularo de la franca lingvo kun karaktera por la nacilingvaj regularoj senreguleco, kontraŭdiroj kaj ĥaoso. Imagu nur la amplekson! Ĉu ĝi estas akceptebla por la internacia lingvo, kies tuta fundamenta gramatiko ampleksas nur du paĝojn?

Kaloesay kaj Waringhien ie elpasas kontraŭ ekzemploj, donitaj en »Fundamento de Esperanto«. En § 204 punkto 2 ili asertas, ke la artikolo devas indiki ulon aŭ aĵon kiel reprezentanton de sia tuta klaso aŭ kategorio. Sed en ekzercoj de la »Fundamento« estas skribita »Leono estas besto. — La rozo apartenas al Teodoro« (§1). La kontraŭdiro estas evidenta ankaŭ sen klarigo. Zamenhof per la ekzemplo kun rozo substrekas, ke li per la artikolo distingas nur **konatajn** aĵojn aŭ ulojn. Kaj tion li eldiras per unufraza regulo en § 27:

> La artikolo »la« estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj.

Se Zamenhof limiĝus per tiu simpla kaj logika regulo, ni ĉiuj scipovus korekte uzi la artikolon. Sed iu diablo flustris al li kunligi sin kun naciaj lingvoj kaj li skribis tuj post la citita frazo: »Ĝia uzado estas tia sama, kiel en aliaj lingvoj«. Tiu diablo supozeble estis la deziro eviti longajn klarigojn pri tia mallonga vorteto.

Pro tiu fatala kunligo aŭ alligo al naciaj lingvoj ni havas hodiaŭ ĥaosan uzadon de la artikolo. Esperantologoj pro tio havas grandan laboron kaj havas per kio plenigi multajn paĝojn de gramatikoj.

Kontraŭdira uzado en esperanto

Kontraŭdiroj inter apartaj reguloj de K. Kalosay kaj G. Waringhien mem estas kelkaj. En § 204, rimarko 1, ili substrekas artikolumon de nocioj por korpopartoj kaj iom pli sube ili en la punkto 2 donas ekzemplon el Zamenhof »La amaso juĝas per okuloj«. En tiu ĉi punkto

ili malprave prenas por argumenti artikolumadon de reprezentantoj de sia tuta klaso aŭ kategorio la ekzemplojn el Zamenhof: »La papero estas tre blanka kaj la neĝo estas pli blanka« kaj »La soldatoj iras pli por la nomo ol por la profito«. Ja ne ĉiu papero estas blanka, ne ĉiuj soldatoj malemas profiton!

Unu el la plej gravaj kontraŭdiroj ĉe Kalocsay kaj Waringhien, kiel ankaŭ en la ĉefaj artikohavaj lingvoj, estas inter punktoj 1 kaj 2 de § 204. Punkto 1 postulas indiki per la artikolo objekton aŭ personon, kiu estas konata al ni pli ol ceteraj aĵoj aŭ uloj de ilia kategorio. Kaj la punkto 2 tion saman postulas por tutaĵo de ilia kategorio. Ĉu ekzistas ie pli granda kontraŭdiro kaj mallogikeco? Per tiu sama indikilo oni markas parton kaj tuton!

Kontrtŭdiro estas ankaŭ inter la menciita § 204 p. 1 kaj § 206 rim. 3-a. En tiu ĉi lasta loko oni diras, ke la nomoj de tempodividoj **ne toleras** la artikolon. Sed se ni serioze traktus tiun ĉi regulon, ni ne povus diri, ekz. »venis la tago, kiun mi longe atendis«, kie la artikolo estas nepra laŭ § 204 p. 1.

Tiamaniere, la instruo de Kalocsay kaj Waringhien pri la artikolo per sia malordeco ne postrestas la regularojn de naciaj lingvoj. Cetere, tiu instruo havas pli konstatan ol rekomendan karakteron kaj tial ankoraŭfoje pruvas ĥaosan situacion pri la artikolo.

Mirko Mamužić en »Kompendio de la Esperanta gramatiko«, eldonita stencile de Kroatia Esperanto-Servo en Zagreb (1959) priskribas uzadon de la artikolo sur 7 grandformataj paĝoj. Mamužić eĉ rezignas pri ebleco prudente solvi la demandon, ĉar li skribas: »Tute precizajn regulojn estas malfacile doni kaj la lernanto devas klopodi, ke li simple »eksentu« la ĝustan uzon«. Ankaŭ li, kiel Kalocsay kaj Waringhien, alskribas al Zamenhofa ekzemplo pri papero kaj neĝo regulon pri reprezentanto de sia klaso, eĉ pri io unika en la mondo. Tamen ja simpla logiko sufloras al ni, ke ne ĉiu papero estas tre blanka, sed iu speciala, do, konata aŭ aludata de la aŭtoro. Ankaŭ blankeco de neĝo ne ĉiam estas egala. En simpla parolado ni ja ne pensas pri ideale pura neĝo. Kiel meriton de Mamužić ni menciu, ke li elpaŝas kontraŭ uzado de la artikolo por indiki reprezentanton de tuta klaso aŭ kategorio.

Vilno Setälä en »Esperantologio«, vol. 2, no. 2 (1961) provas formi unu mallongan senesceptan regulon. Jen la regulo: »La difina artikolo estas uzata en aluda signifo, en tiu senco, ke sen la kunteksto ĝi postulas kompletigon per determinaj vortoj por esprimi la celatan koncepton«.

Sed la citita regulo estas neklara, ĝi entenas fakte nenian instruon, kiam oni devas uzi la artikolon. La aŭtoro asertas, ke li sukcesis

apliki la regulon por ĉiuj ekzemploj de la gramatiko de Kalocsay kaj Waringhien. Do, la aŭtoro eĉ ne celis enporti ian ordon en la konfuzajon.

Ĉu ni toleru ankaŭ plu tiun ĉi ĥaosan situacion? Laŭ mi, por tio ekzistas nek neceso nek pravigo. Ĉu ekzistas ebleco enkonduki ordecan kaj unuecan uzadon de la artikolo sen kontraŭstari la Fundamenton? Laŭ mi, jes.

Ni devas uzi la artikolon laŭ la supre citita regulo, donita en la Fundalenta Ekzercaro, do uzi ĝin nur parolante pri **konataj** objektoj kaj personoj. Tiu ĉi regulo estas ĉefa kaj plej strikte obeata ankaŭ en naciaj lingvoj. Ni nur devis konscii, ke la artikolumindaj objektoj kaj personoj devis esti konataj ne nur al parolanto kaj aŭtoro, sed ankaŭ al aŭskultanto kaj leganto.

Praktika uzado de la artikolo

Kiel apliki la supran tezon en praktiko? Analizu ni kelkajn kazojn.

Se mi diras »mi vidas libron«, tiu libro estas konata nek al mi nek al vi, ĝi povas esti iu ajn el ĉiuj libroj, ekzistantaj en la mondo. La frazo »mi vidas la interesan libron« temas pri libro, konata al mi, sed aŭskultantoj aŭ legantoj ankoraŭ nenion scias pri ĝi. En tia okazo mi rajtas diri nur »mi vidas interesan libron«. Sed daŭrigante la rakonton mi jam povas diri »La libro estas verko de Zamenhof«, ĉar aŭskultanto jam konas ĝin, ĝi estas tiu libro, pri kiu mi anticipe informis lin. Mi ankaŭ rajtas diri sen ajna enkonduko »donu al mi la libron«, se mia aŭskultanto vidas nur unu libron aŭ mi montris, kiun libron mi deziras el la estantaj. Tiu libro tuj fariĝas konata al li.

Se mi skribas aŭ diras »kantado estas agrabla okupo«, vi komprenas, ke ĉia, ajna kantado estas agrabla. Se vi aŭdas aŭ legas, ke »la kantado estas agrabla okupo«, al vi tuj devas aperi demando, **kia** kantado estas agrabla? Do, mi rajtus ĉi tie artikolumi, se mi antaŭe estus iom dirinta pri kantado aŭ kantoj. Ankaŭ mi ne rajtas en komenco de rakonto diri »la kantado de najbaroj enuigas«, kvankam mi ĉi tie jam iom determinis la agon. Ja ne nur kantado, sed ankaŭ kantado de najbaroj ne estas konata al aŭskultanto. Se mi skribas »kantado de najbaroj baldaŭ enuigas«, vi komprenas, ke ĉiu kantado de ajnaj najbaroj enuigas. Sed post la informo, ke »miaj najbaroj ofte kantas«, mi povas kaj devas diri »La kantado de la najbaroj enuigas«, ĉar kaj la kantado, kaj la najbaroj fariĝis konataj al vi vi jam scias, ke temas ne pri iu ajn kantado de iuj ajn najbaroj, sed pri tiu kantado de miaj najbaroj, pri kiu mi parolis antaŭe.

Ofte ni aŭdas antaŭ disiĝo »Ĝis la revido«, eĉ »Ĝis la!«. Sed kutime nek la parolanto, nek la aŭskultanto scias, kiam kaj kie ili revidiĝos, tiun revidon ili ne konas. Do, ni bondeziru nur »Ĝis revido!«, »Ĝis reaŭdo«, se ni anticipe ne interkonsentis pri dato kaj loko de revido aŭ foresta parolo.

Certe ni ĉiam povas uzi, eĉ sen anticipa informo »la tero, la suno, la mondo« ĉar tio estas objektoj, konataj kaj al aŭtoroj, kaj al legantoj. Sed malpravas konstantaj uzantoj de »la paco, la amikeco, la popolo, la angla lingvo«, ĉar tiuj aferoj estas diversaj, la leganto ne scias, pri kiu nome paco, amikeco ktp parolas la aŭtoro. Paco povas esti inter du ŝtatoj kaj (teorie!) inter ĉiuj, ankaŭ interne de unu ŝtato, inter du personoj ktp. **La** angla lingvo de amerikanoj diferencas de la angla lingvo en komuna senco. Ne estas unueca ankaŭ iu alia nacia lingvo, tial ni ne aldonu la artikolon, kiam ni parolas pri iu lingvo en komuna ĝia senco. Sed ni rajtas diri »la internacia lingvo«, kiam ni parolas pri Esperanto, ĉar ni agnoskas nur ĝin kiel internacia. Kompreneble, leganto ankaŭ ĉi tie devas scii, pri kio konkrete temas.

Oni distingas per la artikolo ankaŭ aliajn unikajn objektojn, personojn, ekz. La Nigra Maro, Petro la Unua, ankaŭ »La granda Johano«, »La bela Marinjo«, kvankam la lastaj ne estas historiaj personoj. Tamen similaj titoloj distingas ilin de aliaj kaj faras tuj konataj al legantoj aŭ aŭskultantoj. Al personaj nomoj sen epitetoj oni ne aldonas la artikolon, eĉ ripete menciante. Oni taksas ilin sufiĉe distingitaj per majuskla skribado kaj indika senco dum persona parolado.

Unikan sencon havas ankaŭ titoloj de diversaj verkoj, konkrete tiuj de libroj, gazetoj, versoj, kantoj. K. Kalocsay kaj G. Waringhien skribas, ke titoloj de verkoj regule alprenas la artikolon. Tamen ni jam pruvis, ke ĉi tie ankaŭ regas ĥaoso. La menciitaj aŭtoroj mem agas kontraŭ sia regulo, titolinte sian verkon »Plena gramatiko de Esperanto«, do, sen la artikolo. Oni ne devas artikolumi titolojn de verkoj, ĉar por leganto ankaroŭ ne estas konata la afero, pri kiu li legos en tiu aŭ alia libro.

Ni jam pruvis per ekzemploj el »Fundamenta Krestomatio«, ke oni ne devas aldoni la artikolon, parolante pri reprezentantoj de sia speco. Tial ni diru »homo regas bestojn« kaj »la homo (kiun ni vidas en cirko) regas la bestojn«.

Partoj de homa korpo ne estas unikaĵoj kaj ni ne devas ilin artikolumi, parolante abstrakte. Sed kiam ni parolas pri ies konkretaj korpopartoj, ni (aŭtoroj kaj legantoj) scias, pri kio temas. Tial ni diru »manoj ekzistas por labori« kaj »li levis la manojn«. Se ni aŭdus la lastan frazon sen la artikolo, ni eĉ devus dubi, ĉu li levis siajn manojn aŭ tiujn de iu alia.

Per la donitaj ekzemploj certe ni ne elĉerpis ĉiujn kazojn, ĉiujn situaciojn, en kiuj devas esti uzata aŭ ne uzata la artikolo laŭ la sole valida regulo de la Fundamento. Por eviti miskomprenojn ni citu ĉi tie ĉion, kio koncernas la artikolon en la Fundamento.

El la »Plena Gramatiko de Esperanto«:

1. **Artikolo** nedifinita ne ekzistas; ekzistas nur artikolo difinita **(la)**, egala por ĉiuj seksoj, kazoj kaj nombroj.

Rim. La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas en la unua tempo tute ĝin ne uzi.

El la »Ekzercaro«:

§ 27.

La artikolo »la« estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj. Ĝia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa. Anstataŭ »la« oni povas ankaŭ diri »l'« (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo).

Kiel ni vidas, en la fundamenta gramatiko pri uzado de la artikolo »kiel en la aliaj lingvoj« oni skribas nur en rimarko, en la ekzercaro tiu rimarko ankaŭ estas duavica. Do ĝi havas nur klarigan karakteron. Kiel ni pruvis en la supra teksto, uzado de artikoloj en diversaj lingvoj estas diversa. Kongruas tamen la uzado de la artikolo difina por indiko de personoj kaj objektoj konataj. Tial nur tiusence validas la tezoj de la Fundamento pri uzado de la artikolo.

Zamenhof mem donis grandan liberon en uzado de la artikolo, tamen ni devus memori ankaŭ lian bonan konsilon:

> Tute vane vi faris al vi multe da klopodoj kun la uzado de la artikolo. Vi devas memori, ke en nia lingvo la uzado de la artikolo ne estas deviga; sekve la plej bona maniero de agado estas jena: uzu la artikolon tiam, kiam vi scias certe, ke ĝia uzado estas necesa kaj postulata de la logiko, sed en ĉiuj **dubaj** okazoj ĝin ne uzu. Pli bone estas ne uzi la artikolon en tia okazo, kiam ĝi estas necesa, ol uzi ĝin tiam, kiam la logiko kaj la kutimoj de ĉiuj popoloj ĝin malpermesas. Se vi ekzemple diros »venis tago, kiun mi tiel longe atendis«, via frazo estos ne tute bonstila, sed ne rekte erara, kvankam oni devus ĉi tie diri **»la** tago«; sed se vi diros »hodiaŭ esas **la** dimanĉo« anstataŭ »hodiaŭ estas dimanĉo«, tiam vi faros rekte **eraron**, kiu estos malagrabla

por la oreloj de ĉiu bona esperantisto«. (Dro L. L. Zamenhof, LINGVAJ RESPONDOJ (plena kolekto) Paris, 1936, paĝoj 53-54).

Mi deziras atentigi precipe pri la tezo, ke en dubaj kazoj la artikolo tute ne estas uzenda. Ĉie oni rimarkas ĝian trouzon. Ni komencu lerni la regulan uzadon per sindeteno. Bona konsilo por pruvi neceson de la artikolo estas ĝia anstataŭo per la vortoj »tiu« aŭ »tiu ĉi«. Se post la ŝanĝo senco de frazo ne aliiĝas, la artikolo estas ĝuste uzita.

R e s u m o

Influo de naciaj lingvoj kun diversa uzado de artikoloj kaŭzis haosan staton en Esperanto ĉi- rilate.

Por strebi al reguleco ni devas obei nur la sole validan regulon pri uzado de la artikolo, donitan en »Fundamento de Esperanto«: **»La artikolo »la« estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj«.** Konataj ili devas esti ne nur al parolanto aŭ skribanto, sed ankaŭ al aŭskultanto kaj leganto.

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 20. n-ro 2 (1969)

408.9

ATENTINDA VERKO

(R. Sikorski, Omsk, Sovetunio)*

En la 1968. en Sovetunio aperis libro, eldonita de la Instituto de Filozofio de la Akademio de Sciencoj. Ĝia titolo estas „Kiel kreiĝos universala lingvo?". La libro estas frukto de pli ol tridekjara laboro de ĝia aŭtoro E. Svadost super la temo. Sur 286 paĝoj la aŭtoro defendas la tezon, ke estonta universala lingvo de la homaro estos lingvo laŭplane kreita de lingvistoj en kunlaboro kun homamasoj. La aŭtoro ne akceptas la ideon de internacia h e l p a lingvo; li aspiras al unusola universala lingvo de la tuta homaro, lingvo, kiu nur dum relative mallonga periodo ludos la rolon de h e l p a lingvo, la dua post la gepatra.

E. Svadost skizas planon de tiu lingvokreado, kies realigon li opinias necesa komenci jam nun. Lia plano antaŭvidas fondon de la granda aro de diversaj institutoj por teoria studado de la problemo de diversaj flankoj: filozofia, lingvistika ktp. poste sekvos ellaborado de teoriaj principoj sur kiuj baziĝu la kreado de universala lingvo kaj nur post tio sekvos la kreado mem, efektivagata de kolektivoj de interlingvistoj. Lia plano antaŭsupozas tiom grandan nobron de interkonsentoj inter diversaj aŭtoritatoj, institucioj, lingvistoj ktp. ke ĝia realigo aperas tute utopia — almenaŭ dum proksimaj jarcentoj.

La aŭtoro mem faras nur malmultajn proponojn pri la lingva aspekto de universala lingvo. Interalio li eldiras interesan ideon, nome ke leksikonoj de materialaj valoraĵoj, de ekonomiaj produktaĵoj, estu kreitaj laŭ principo de aprioraj lingvoprojektoj (ekzemple Ro), dume ke la komuneuzataj vortoj elektiĝu laŭ aposteriora principo el naciaj lingvoj Kiamaniere interadapti la du manierojn estas problemo solvenda.

---

*) Dolgireva 60, kv. 29, OMSK 33, Sovetunio